
# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

37-a Jarkolekto - Marto 2023 - N-ro 128

# Purchena

## (Almerio)



## Januaro / Marto 2023
## Enhavo

P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 06 La judhispana, lingvo preskaŭ mortigita de la nazioj.
P. 10 Lingva Angulo: *la preposición PRO* .
P. 13 Poezia Angulo.
P. 14 Nuntempa Vortaro: *Kadiza Karnavalo.*
P. 16 Folioj por Praktikado.
P. 20 Turismi en ... *Purchena (Almerio).*
P.25 Bilda raporto pri la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto. Sevilo, oktobro 2023
P. 32 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Joaquín Mañas kaj la "Centro Técnico" de Malago.*
P. 35 $E=mc^2$ Scienca Angulo: *Vojaĝi en la estontecon estas eble.*
P. 37 Flamenko: *"La Flamenka Fuzio".*
P. 39 Fervojista angulo: *La tramo de Jaeno. Ĉu forgesita afero?*
P. 41 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 44 Andaluzia kuirarto: *Kokidaĵo laŭ maŭra stilo.*
P. 46 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La ekzekutisto de la granada kortumo.*
P. 48 Vorto-ludoj.
P. 50 Humuro.

# *Gazeto Andaluzia*

***Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.***

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:
Fabián Jiménez Jiménez.

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

*Sur la kovrilo:*
*Ĝenerala vidaĵo de Purchena (Almerio)*





## REELDONITA KLASIKA LIBRO-METODO POR LERNI LA INTERNACIAN LINGVON




José Garzón Ruiz ne nur estis la fondito de nia revuo en la jaro 1910, li estis ankaŭ aktiva esperantisto kaj sen-laca disvastiganto de la internacia lingvo. Inter pliaj agadoj, li fondis kelkajn grupojn kaj li ankaŭ verkis librojn en esperanto.

Unu el tiuj libroj verkitaj de ĉi tiu elstara kadiza advokato estis "Prontuario de Esperanto", eldonita unuafoje en la jaro 1909 fare de la barcelona eldonejo "Sucesores de Manuel Soler". Nun, pli ol cent jarojn poste, la galega eldonejo "Publicaciones Arenas" decidis reeldoni tiun libron kun la titolo "¿Quiere usted hablar Esperanto? - Manual Práctico de Conversación" *(Ĉu vi volas paroli Esperanton? - Praktika manlibro pri konversacio)*

Kompreneble, ne temas pri la plej aktuala kaj avangarda libro-metodo por lerni la zamenhofan lingvon, tamen ĝi estas plia rimedo por regi esperanton. Estu ĉiam bonvena la reeldono de klasikaj libroj en esperanto fare de ne-esperantistaj eldonejoj.

# ESPERANTO EN LA GIMNAZIO "MARQUÉS DE COMARES" EN LUCENA (Kordovo)

Nova kurso de esperanto en mezgrada lernejo en Andaluzio. Al tiu jam okazanta en la gimnazio "Almenara" en Vélez-Málaga, aldoniĝis pasintjare nova kurso en la gimnazio "Marqués de Comares" en la kordova vilaĝo Lucena. Tiel, dum la lerno-jaro 2022/2023 profesoro Juan Diego Díaz Bautista renkontiĝis ĉiu-ĵaŭde kun lernantoj kaj profesoroj dezirantaj lerni ne nur la internacian lingvon, sed ankaŭ ties kulturon.



Prof. Juan Diego Díaz kun kelkaj interesitoj pri la internacia lingvo en la biblioteko de la gimnazio "Marqués de Comares" en Lucena (Kordovo)

La celo de ĉi tiu agado estas ne nur disvastigi esperanton, sed ankaŭ, kiel jam okazas en mezgrada lernejo en Vélez-Málaga, oficialigi la instruadon de la internacia lingvo kiel alia plia lerno-objekto en oficiala lernejo en Andaluzio.

Pliaj informoj ĉe:

https://sites.google.com/view/tallerdeesperanto/inicio

## ALIĜU AL
## Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivas la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

## HAZTE SOCIO DE LA
## Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto




# La judhispana, lingvo preskaŭ mortigita de la nazioj

**Alejandro Burgos Escalante**

**Historio.-**

Iom nekonata lingvo, kiu tamen estas latinida kaj ankoraŭ parolatas de kelkcent miloj da homoj, estas la judhispana. Multaj fakuloj debatadis, ĉu la judhispana estas dialekto de la hispana aŭ lingvo per si mem. Nuntempe (preskaŭ) neniu dubas, ke la judhispana estas riĉa lingvo devenanta el la mezepoka hispana. Mi skize prezentos al vi kaj la historion kaj la aspekton de la judhispana lingvo.

La historio de la judhispana lingvo, ankaŭ ĝudezmo (djudezmo) aŭ ladino, komencas kiam la judoj estis forpelitaj el Hispanio pere de la Edikto de Granado (1492), leĝfarita de la Katolikaj Gereĝoj. Unuamomente, la hispanaj judoj (sefardoj) setlis en Eŭropo (Otomana Imperio) kaj en la nordo de Afriko. Notu la novajn loĝlokojn de la sefardojn, tial, ke novaj dialektoj naskiĝos proe; ni priparolos pri tio je la fino. Ĉie kie ili loĝis ili konservis kaj la lingvon kaj la kulturon.

Ĉio rilate al la judhispana ne estas feliĉa. Ekde la 19-a jarcento, la lingvo renkontis deklivon pro la sekulariĝo kaj pro la fondiĝo de novaj universalaj judaj asocioj, kiuj instruis en aliaj pli parolataj eŭropaj lingvoj, kiel la franca aŭ la germana.



Editora Proprietaria I Direktrisa en kapo :
* ROSA BUENO
Vice Direktor I Sekretario General :
* NISSIM BUENO
Redaktor :
Dr.Yaakov Rasier

LA LUZ DE ISRAEL

עתון בשפה הספניולית — לאדינו בלתי תלוי
לה לוס דישראל

"LA LUZ DE ISRAEL"
Por komunikar Fiksar enkontro I dar Reklamas
TELEFONA A :
03-868236
Letras eskrivid a :
P.O.B. 1077
BAT YAM - 59110,ISRAEL

Anio 18 - No.2039 - Jueves 9 Novembre 1989 ( 11 Hechvan 5750) — PRESIO 2.80 CH'H i M.E.M.

**AMERIKA DARA GARANSIAS A ISRAEL I A LOS PALESTINIANOS**

James Baker
Itshak Chamir

Enfin, despues de longos debates, diskusiones, pressiones de parte de Amerika sovre Israel, de akseptar el program de pas de 5 puntos, ke presento el ministro amerikano del eksterior James Baker, el Kabinet Governemantal, kon la partisipasion de los" kuatro", sea el primer ministro sr. Itshak Chamir, su remplasante i ministro de finansas sr. Chimon Peres, el ministro del eksterior sr. Moche Arens, el ministro de la defensa sr. Itshak Rabin , mantuvieron una reunion urjente i dessidaron de akseptar a los 5 puntos de James Baker, despues ke i Baker aksepto de azer siertas livianas reparasiones en este program ... ra sovre las garansias ke dara Amerika a Israel.

De otra parte, los amerikanos izieron kalmar a Egipto, diziendo ke daran garansias i a los palestinianos .

* LAS KONDISIONES KE AKSEPTO ISRAEL

Los 5 puntos ke aksepto Israel son:

* Konversasiones avra despues ke sera aparejada la lista de los moradores palestinianos de Yehuda Chomron i Gaza, kon los kualos Israel akseptara a tratar .
* Israel no avlara ni tratara kon Achaf .
* El sujeto prensipal sera sovre las eleksiones en los territorios, ansi, sigun figura en la inisiativa de pas de Israel ...

**MANIANA — VIERNES ORAS 9.05 KOMEMORASION DEL GRANDE M.KEMAL ATATURK AL KUMPLIR 51 ANIO**

Por : Nissim Bueno

El Grande i Innolvidavle M . Kemal Ataturk, komo savido murio en 10. 11.38 a las oras 9. 05 i de estonses, en kada anio, se organizan seremonias de komemorasion en la misma data i misma ora en toda la Turkia i demas, en todas las institusiones i representasiones ofissialas i diplomatikas de Turkia a traverso el mundo.

Maniana-Viernes 10 Novembre, a las oras 9.05 egzakto, se komemorara el 51 anio de la disparision del Grande Heroe i Salvador del Puevlo Turko, ke decho el mas valutozo regalo- La Republika Moderna i Demokrata en Turkia.

( A Kontinuar en paj. 12 )


***En el Klub Kultural de Orijinarios de Turkia en Herzelia–Pituah donaron 35 mil ch. para las charas del Karmel***

( Melda en pajina 6 )

*La Luz de Israel*, gazeto eldonita en la judhispana lingvo. Ĝi ekaperis en Turkio en la jaro 1909, nun ĝi estas eldonita en Israelo.

La judhispana, konsekvence, iĝis pli familia, pli tradicia kaj malpli teĥnika. Alia grava okazaĵo estas la ekiĝo de cionismo. La cionismo postulis judan ŝtaton en Sankta Lando, t.e. la historie konata Palestino (Palaestina, en latino) kaj, tiucele, la hebrea lingvo estis "revivigita". La gramatiko estis simpligita kaj novaj modernaj vortoj eniris la vortaron.

La judhispana admirinde defendis sin kontraŭ la atakoj de aliaj pli grandaj lingvoj, kiel la franca, la germana aŭ la tiama ĵus revivigita hebrea. Sefardoj publikigis librojn, revuojn kaj eĉ ĵurnalojn en sia propra lingvo. Ili riĉigis la vortprovizon de la judhispana per vortoj el la turka, la greka, la hebrea aŭ eĉ la araba lingvoj.




Afiŝo en la nazia koncentrejo en Auschwitz, ĝi aperas en la judhispana lingvo.
Jen la traduko:

"Ke ĉi tiu loko, kie nazioj ekstermis unu milionon kaj duonon da viroj, virinoj kaj infanoj, plejmulte el ili judoj, de diversaj eŭropaj ŝtatoj, estu por ĉiam, por la homaro, krio kaj signaloj de despero."

La judhispana, tamen, preskaŭ formortis pro la Dua Mondmilito. Ni memoru, ke nazioj senkompate persekutis la judojn ne nur en Germanio kaj Aŭstrio, sed ankaŭ en aliaj landoj. En Grekio, granda komunumo de judhispanparolantoj ekzistis en Tesaloniko, unu el la plej gravaj urboj en la lando. Kiam Italio kaj poste Germanio invadis Grekion, la tieaj judoj bedaŭrinde estis dissenditaj en ekstermejojn kaj tie mortigitaj. La judhispana perdis grandan parton de sia parolantaro, kiel la jida, la alia juda lingvo kiu devenas el la germana. La nazioj, tamen, ne sukcesis formortigi la judhispanan aŭ la jidan. Feliĉe ambaŭ supervivis kaj ade parolatas.

Nuntempe, la stato de la judhispana iomete pliboniĝis. Multaj el la judoj kiuj loĝis en la antikvaj teritorioj de la Otomana Imperio, ekloĝis en la ĵus naskiĝinta Israelo. Oni ade eldonas revuojn (*Aki Yerushalayim, El Amanecer*), ĵurnalojn kaj librojn (kaj originalajn kaj tradukitajn) kaj kelkaj radiostacioj daŭre elsendas en la judhispana, kiel Ekstera Radio de Hispanio kaj Reka (Israelo).

La lingvo, tamen, trovas novajn defiojn. Multaj judhispanparolantoj demandas sin, ĉu la lingvo efektive formortos pro la manko de parolantoj, tial, ke la novaj generacioj anstataŭigis la judhispanan per la hebrea. Ni povas nur esperi, ke la judhispana plu floru ĉie en la mondo.

**Ecoj de la judhispana.-**

En kiu alfabeto oni skribas la judhispanan? Verdire, nuntempe ĝi estas skribita nur per la latina alfabeto, tamen en la estinteco la sefardoj skribis sian propran lingvon en la alfabetoj de la loko kie ili loĝis, kiel en la rusa, araba aŭ la greka alfabetoj. Aldone, tial, ke la juhdispana estas juda lingvo, sefardoj skribis ankaŭ en la hebrea alfabeto.

Nuntempe, kiel mi diris, oni skribas ĝin per la latina alfabeto, sed kelkaj ankoraŭ pene skribas pere de la hebrea alfabeto. La judhispana uzas tradicie la raŝian* skribadon kaj ĝi ankoraŭ uzatas kiam oni skribas nur permane.

Resume, la latina kaj la hebrea alfabetoj kunvivas feliĉe en la sefarda tradicio. Notinde estas la fakto, ke nuntempe la plej grava revuo verkita plene en la judhispana, *Aki Yerushalayim*, normigis la ortografion de la lingvo. La *Autoridad Nasionala del Ladino* (Nacia Aŭtoritato de la Judhispana) kaj *Akademia Nasionala del Ladino* (Nacia Akademio de la Judhispana) havas la taskon studi la judhispanan.

Laste, sed ne balaste, ni komparu la judhispanan kaj la hispanan pere de tre simpla kaj mallonga interparolo:

| Judhispana | Hispana | Esperanto |
|---|---|---|
| - Buenas tadres, sinyor. Avlásh el djudeo-espanyol? | - Buenas tardes, señor ¿Habla judeo-español? | - Bonan vesperon, sinjoro Ĉu vi parolas la judhispanan? |
| - Si, mis nonos son de Salonika. Ainda avlo el djudeo-espanyol, ma solo en kaza. | - Sí, mis abuelos son de Tesalónica. Aún hablo el judeo-español, pero solo en casa. | - Jes, miaj geavoj estas el Saloniko. Mi ankoraŭ parolas la judhispanan, sed nur hejme. |
| - Me plaze verte. Kualo es tu ofisio? | - Me place verte. ¿Cuál es tu oficio? | - Estas plezuro renkonti vin. En kio vi laboras? |
| - So moendiz en una fabrika. | - Soy ingeniero en una fábrica. | - Mi estas inĝeiero en fabriko. |
| - Mazal bueno! | - ¡Buena suerte! | - Fortunon! |

Ĉi tie oni devas rimarki tre gravan econ de la judhispana. Tial, ke judoj setlis precipe en du partoj, la Otomana Imperio kaj en la nordo de Afriko, estas du grandaj dialektoj, la ĥaketia* (Nordafriko) kaj ladino (Otomana Imperio). Per la interparolo, ni povas rimarki, ke la judhispana ankoraŭ konservas kelkajn ecojn de la mezepoka hispana, precipe kelkajn vortojn kaj gramatikaĵojn. Notu kelkajn ŝanĝojn kaj novajn vortojn el aliaj lingvoj:

- Abuelo *Nono* (la vorto «avuelo» ekzistas en la judhispana).
- Pero *Ma* (el la greka «μα»).
- Ingeniero *Moendiz* (el la turka «mühendis»).
- Suerte *Mazal* (el la hebrea «מזל»).

Se vi volas lerni aŭ nur eksperimenti la judhispanan lingvon, jen materialoj por vi:

*Aki Yerushalayim* (revuo): https://mallonge.net/15z
Emisión en serfardí (radioelsendo): https://mallonge.net/161
Ladino 21 (YouTube-a kanalo): https://mallonge.net/160
Markova, A. (2018). Beginner's Ladino with Online Audio. Hippocrene.
Pascual, P. (1977). Diccionario básico ladino-español. Riopiedras ediciones.
Varol, M. (2008). Manual of Judeo-spanish. University Press of Maryland.

*Raŝia estas ne-PIVa vorto: https://mallonge.net/162

*Ĥaketia estas ne-PIVa vorto: https://mallonge.net/163

**Ambezate el ladino! Lernu la judhispanan!**

**Ĉu vi emas verki en esperanto? Ĉu vi deziras kunlabori kun nia revuo? Se jes, ne hezitu sendi viajn kontribuaĵojn. *GAZETO ANDALUZIA* deziras esti eldonaĵo kie ĉiuj povas kunlabori. Jen nia retpoŝto: cordoba14@esperanto.ac**




PRO es la preposicion que indica la causa o el motivo de algo. Podríamos traducirlo en español como "a causa de". Veamos algunos ejemplos:

- Mi ne povis grimpi la monto-pinton pro miaj lacigitaj kruroj.
  *No pude escalar la cima de la montaña a causa de mis piernas cansadas.*

- Mi ne povas vojaĝi en vian urbon dum somero pro la varmego.
  No puedo viajar a tu ciudad durante el verano a causa del fuerte calor.

- Li ridis pro mia naiveco.
  *Él se rió a causa de mi ingenuidad.*

También la podemos usar cuando decimos en español "por", pero siempre con una idea de causa o de motivo:

- La aŭtomobilo ne povis iri pli antaŭen pro manko da bezino.
  *El automóvil no pudo ir más adelante por falta de gasolina.*

- Li atingis tiun heroaĵon nur pro deziro de gloro.
  *Él consiguió esa heroicidad solo por un deseo de gloria.*

- Mi devas paroli kun vi pro tre serioza afero.
  *Yo debo hablar contigo por una razón muy seria.*

***PRO: "a causa de", "por".***

Usamos también la preposición PRO en esperanto en las interjecciones donde decimos "Por":

• Pro Dio, helpu min!
*¡Por Dios, ayúdame mi!*

• Donu al mi moneron, pro kompato!
*¡Dame una moneda, por compasión!*




Otro uso de la preposición PRO lo encontramos cuando tenemos que hablar del pago de cosas que se compran y se venden.

• Kiom da mono oni petas pro tiu domo?
*¿Cuándo dinero se pide por esa casa?*

• Ĝi ne estas multekosta, vi povas aĉeti ĝin pro dek mil eŭroj.
*No es muy cara, la puedes comprar por diez mil euros.*

• Se vi aĉetas tiun antikvaĵon pro dek eŭroj, vi faros tre grandan negocon.
*Si compras esa antigüedad por diez euros, harás un gran negocio.*

• Ne pagu pro tiu libro pli ol dudek eŭroj.
*No pages por ese libro más de veinte euros.*

**Pagar dinero por algo = *Pagi monon pro io***

Podemos usar también la preposición PRO antes de una oración subordinada que empieza por KE, con la idea de que esa oración explique un motivo una causa referida a la oración principal. En este caso tenemos que usar PRO TIO, KE (por eso, que).

• Li atingis bonan labor-lokon pro tio, ke li multe studis.
*Consiguió un buen puesto de trabajo, porque estudió mucho.*

En este caso lo más usual sería usar ĈAR o incluso TIAL, KE (esta construcción ya la vimos en el número anterior), pero también podemos decir PRO TIO, KE:

• Vi ne devas krii pro tio, ke infano dormas en apuda ĉambro.
Vi ne devas krii, tial ke infano dormas en apuda ĉambro.
Vi ne devas krii ĉar infano dormas en apuda ĉambro.

*No debes gritar porque un niño duerme en la habitación de al lado.*

También podemos usar PRO en frases interrogativas, con la idea de preguntar por la causa de algo. En este caso la pregunta PRO KIO? (¿A causa de qué?) sería muy similar a KIAL? (¿Por qué?) e incluso a POR KIO? (¿Para qué?)

• Pro kio vi lernas esperanton?
Kial vi lernas esperanton?
Por kio vi lernas esperanton?

Mi lernas esperanton pro tio, ke mi deziras vojaĝi tra la tuta mondo.
Mi lernas esperanton ĉar mi deziras vojaĝi tra la tuta mondo.
Mi lernas esperanton tial, ke mi deziras vojaĝi tra la tuta mondo.

De todos modos hay que indicar que el uso más usual es KIAL? ĈAR.

Por último hay que mencionar que la preposición PRO también puede aparecer unida a otra palabra, dotándola de un significado particular y expresando algo relativo al motivo o a la causa de la palabra a la que acompaña:

• Propeka ago: una acción motivada por un pecado.

• Promemora omaĝo: un homenaje que se hace como recuerdo de algo.

• Doni proprunte: Dar a causa de un (como) préstamo.

# *POEZIA ANGULO*

## AL UNU VIRO GRANDA-NAZA


Pri viro temas, apendic' de nazo,
pri nazo temas, ja superlativa,
pri alambiko temas, duonviva,
pri spado-fiŝo de aĉ-barba klaso,

pri sun-gnomon' el sek-miena bazo,
pri elefanta rostro suprendriva,
pri jud-skribista naz' imperativa,
pri turpa-naza Ovidio Naso.

Kiel galera pruo ĝi majestas,
kiel egipta piramido spita.
La dek-du nazo-tribojn ĝi sugestas.

Nazulo kun flarilo infinita,
lia enorma protonazo estas
livida perniego ulcerita.

*Francisco de Quevedo*



Francisco de Quevedo
1580 - 1645



Luis de Góngora
1561 - 1627

Estas konata la malamikeco inter du grandaj hispanaj poetoj de la 17-a jarcento, Quevedo kaj Góngora, ĉi lasta naskiĝis en la andaluzia urbo Kordovo. Quevedo estis la plej grava reprezentanto de la poezia stilo *konceptismo*, laŭ kiu estus prefere verki per klaraj, simplaj kaj inteligentaj konceptoj. Male, Góngora apartenis al *kulteranisma* skolo, kiu preferis uzi komplikajn versojn kun la celo plifortigi priskribojn en la tekstoj.

Rezulto de tiuj malbonaj rilatoj naskiĝis belega poemo, kies aŭtoro estas Francisco de Quevedo, pere de ĝi li primokas la kordovan aŭtoron pro la granda nazo kiu "ornamis" la vizaĝon de Luis de Góngora.

La teksto estis esperantigita de Antonio Marco Botella.




# KADIZA KARNAVALO



**Bando**

Grupo de amatoraj muzikistoj, proksimume 15, akompanitaj de gitaroj, tamburo kaj tamburego. La ĉefaj temoj de la kantaĵoj ne estas esence mokemaj. Ili pliofte prikantas temojn rilatajn al emocioj, lirikismo de la urbo kaj la karnavala festo.



**Ŝerco-bando**

Grupo de amatoraj muzikistoj, inter 7 kaj 12. La ĉefaj temoj de la kantaĵoj estas primokemaj.



**Ĥoro**

Temas pri la plej tipa bando da muzikantoj en la kadiza karnavalo. Al ĝi apartenas maksimume 45 anoj, inter kiuj troviĝas kantistoj kaj orkestro.



**Kvarteto**

Grupo inter 3 kaj 5 partoprenantoj, akompanitaj, foje, de gitaro kaj fajfiloj ludas ridindigan ironion de la ĉiutaga vivo.



Duonmasko



Gitaro



Liuto



Hispana mandolino



Fajfilo



**Surstrataj ŝerco-bandoj**

Grupo de amatoraj muzikistoj, simila al aliaj ŝerco-bandoj, tamen ili ne partoprenas en la oficiala konkurso de la Teatro "Falla". Pro tio, ili ankaŭ estas konataj kiel "kontraŭ-leĝaj".




**Surstrata karuselo de ĥoroj**



**Vango-ruĝo**

Ambaŭ cirkloj ruĝkoloraj, troviĝantaj sur ĉiu vango. Ili anstataŭas tre ellaboritan karnavalan ŝminkadon pere de simpla simbolo.



**Bastonetoj**

Ligna bastona klakilo uzata de la membroj de kvarteto.

# Folioj por praktikado



## KAJTOJ NE NUR GAJIGAS LA ĈIELON

Kajtoj verŝajne estis inventitaj de fiŝkaptistoj el aziaj insuloj. Ili aperis antaŭ ĉirkaŭ 2500 jaroj. Komence ilia celo estis altiri la atenton de spiritoj. Sed ili rapide fariĝis mesaĝiloj kaj ankaŭ armiloj, ĉar ili permesis ataki la malamikon per fajro. Poste montriĝis, ke ili ankaŭ kapablas transporti homon!

Kajtoj aperis en la Okcidento nur fine de la 12-a jarcento, sed vere utilis en diversaj fakoj ekde la 18-a jarcento. Tiam oni malkovris, kiel per kajtoj eblas forigi la danĝeron de fulmo. Kaj fine de la 19-a jarcento, oni faris la unuajn fotojn el la aero per fotilo ĉe kajto!

En nia tempo eblas aĉeti multajn specojn de kajtoj je ĉiaj prezoj, kelkfoje tre multekostaj. Ekzistas ankaŭ simplaj kajtoj faritaj per ligno kaj tukoj, arbofolioj aŭ filikoj, aŭ eĉ per ordinaraj plastaj sakoj. Kaj ludantoj same ĝojas pri ĉiuj!

Kiel ĉiam, ilia uzo dependas de la homoj kaj de iliaj celoj.

En milito, kajtoj utilis en la pasinteco por kontroli la agojn de la malamiko aŭ por ataki regionojn per fajro. Ni ĉiuj scias, ke ilia plej moderna parenco, flugrobotoj, tre utilas dum militoj.

**> gajigas**

La frase *Kajtoj ne nur gajigas la ĉielon*, puede traducirse por "Las cometas no solo hacen divertido el cielo". El sufijo "-ig" significa "hacer....", suele unirse a adjetivos, formando un verbo que significa "hacer lo que ese adjetivo indica". En este caso va unido al adjetivo *gaja* (divertido) y puede traducirse por "hacer divertir" *gajigi*. Veamos algunos ejemplos:

*blanka / blankigi* (blanquear) *kulpa / kulpigi* (culpar) *laca / lacigi* (cansar)

### > estis inventitaj

Aunque existen en la gramática esperantista, no es muy habitual el uso de verbos compuestos. En español decimos habitualmente "yo estoy leyendo" o "tú has comido pescado", pero en esperanto es más usual utilizar la forma simple de los verbos, así *"mi legas"* o *"vi manĝis fiŝaĵon"*. Pero a pesar de este uso poco habitual hay que afirmar que es posible usar verbos compuestos en la lengua internacional. El verbo que se utiliza como auxiliar es *"esti"* (ser, estar, haber) al que acompaña el participio del verbo, que podrá ser participio presente *"-ata"*, pasado *"-ita"* o futuro *"-ota"*.

Ejemplos:

*Kajtoj estis inventitaj de fiŝkaptistoj.*
Las cometas fueron inventadas por pescadores.

*La filmo estos tre bone akceptata de la publiko.*
La película será muy bien recibida por el público.

*La informo estas konata de multaj homoj.*
La noticia es conocida por muchas personas.

### > antaŭ ĉirkaŭ 2500 jaroj

La traducción literal es "hace alrededor de 2500 años", podría decirse también "antaŭ proksimume 2500 jaroj". Para decir "hace...." referido a un período de tiempo usamos "antaŭ...". Ejemplos:

*Antaŭ kelkaj milionoj da jaroj homoj ne uzis fajron.*
Hace algunos millones de años los hombres no usaban el fuego.

*La profesoro avertis pri la ekzameno antaŭ du semajnoj.*
El profesor advirtió sobre el exámen hace dos semanas.

### > fariĝis .... montriĝis

No confundamos el sufijo que vimos en la página anterior "-ig" (hacer algo) con este que estudiamos ahora "-iĝ" (hacerse). La idea es muy similar, tan solo que "-iĝ" comporta una idea de reflexivo, es decir, no se trata de "hacer algo", sino "convertirse o hacerse algo".

| | | |
|---|---|---|
| Blanka: color blanco | Blankigi: blanquear | Blankiĝi: blanquearse |
| Kulpa: culpable | Kulpigi: culpar a... | Kulpiĝi: culparse a sí mismo. |
| Laca: cansado | Lacigi: cansar a... | Laciĝi: cansarse |

En el texto las traducciones serían:

- *Ili rapide fariĝis mesaĝiloj.*
  Ellas rápidamente se hicieron (se convirtieron) en mensajeros.
- *Poste montriĝis, ke ili ankaŭ kapablas transporti homojn.*
  Después se mostró, que ellas también eran capaces de transportar hombres.

### > oni malkovris

"Oni" es un pronombre que se refiere a algo impersonal, es similar al español "se" en "se dice", "se cuenta". Es decir, hay un sujeto en la oración, pero es impersonal, no se conoce quién es. Ejemplos:

*Oni malkovris la fajron antaŭ miloj da jaroj.*
Se descubrió el fuego hace miles de años.

*Oni diras, ke vi estas tre laca kaj pro tio vi ne deziras labori plu.*
Se dice que estás muy cansado y por eso no deseas trabajar más (tiempo).

*Oni bezonas novajn laboristojn por la fabriko.*
Se necesitan nuevos trabajadores para la fábrica.

### > Forigi

Hemos visto anteriormente el uso del sufijo *"-ig"* que otorga a la palabra a la que acompaña una idea de "hacer ...." La hemos usado con adjetivos, así *"blanka / blankigi"* (blanco / blanquear), pero por lógica -y no olvidemos que el esperanto es pura lógica-, se podría utilizar con cualquier palabra, también con una preposición.

En el texto encontramos *"forigi"*, es decir añadimos el sufijo *"-ig"* a la preposición *"for"* (lejos), de este modo *"forigi"* sería "hacer lejano". En el texto que hemos leído: *"eblas forigi la danĝeron"* (es posible hacer lejano -ahuyentar- el peligro)

### > ĉe

La traducción literal de "ĉe" es "en casa de, en". Esta preposición da idea de que algo se encuentra en un lugar pero con el matiz especial de que se encuentra en contacto o pegado a algo.

En el texto *"fotilo ĉe kajto"*, no solo indica que una cámara de fotos está en la cometa, sino que está unido a ella.

### > je ĉiaj prezoj

La preposición "je" es genérica, es decir, no tiene un significado siempre igual en todos los casos en que la emplemos. La utilizamos cuando no resulta clara ninguna otra preposición. En español muchas veces se puede traducir como "a", aunque no siempre tiene esa traducción. Ejemplos:

Je kioma horo vi alvenos morgaŭ?
*¿A qué hora vendrás mañana?*

Li ne estas kontenta je sia sorto.
*Él no está contento con su destino.*

La bela monumento troviĝas je kelkaj kilometroj.
*El bello monumento se encuentra a algunos kilómetros.*

En cuanto al adjetivo "ĉia", vemos que se trata de una palabra que aparece en el famoso cuadro cartesiano de voces simples, tan característico del esperanto. Está compuesto por la raíz "ĉi-" (todo) y la terminación del adjetivo "-a". Se puede traducir por "todo tipo de". El ejemplo en esta frase sería "a todo tipo de precios".

### > faritaj per ligno kaj tukoj

*Hechas con madera y pedazos de tela.* Ya hemos dicho anteriormente que el participio se forma en esperanto con los finales "-ata" (presente), "-ita" (pasado) y "-ota" (futuro). Lo lógico cuando se trata de un resultado, es decir de algo que ya está hecho, es que utilicemos el participio en pasado. En el ejemplo "farita" es el participio pasado del verbo "fari" (hacer), de este modo la traducción sería "hecho". Aplicado al resto de los tiempos del participio "farata" significaría que está hecho en este momento, y "farota" que estará hecho en el futuro.

En el ejemplo que aparece en el texto le sigue la preposición "per" (por medio de). En español habríamos empleado con "está hecho con madera...", pero en esperanto la preposición "kun" da una idea de compañía, de proximidad, pero no de que algo se utilice como un instrumento o como un medio, como sí ocurre con la preposición "per" (por medio de).

Veamos algunos ejemplos de la preposición "per":

*Mi plenigas la botelon per akvo.*
Yo lleno la botella con (por medio de) agua.

*Tenu forte la libron per viaj manoj.*
Coge fuerte el libro con (por medio de) tus manos.



# Turismi en ... PURCHENA (Almerio)

Purchena (prononcu: Purĉena) estas bela kaj kvieta urbo, ĝi estas unu el la plej belaj vilaĝoj en la provinco Almerio, konata kiel *"la perlo de Almanzoro"*, rivero kaj valo kiuj troviĝas en la plej orienta andaluzia provinco.

Dum la Bronzepoko sur tiu zono jam ekzistis setlejo, pri ĝi oni trovis kelkajn dolmenojn, malgrandajn murojn kaj tombejon, en la Nacia Arkeologia Muzeo de Madrido eĉ videblas dudeko da malgrandaj idoletoj trovitaj ĉirkaŭ Purchena. Romianoj fondis tie urbon kun la nomo *Illipula Magna*, enkadrigita fare de la imperiestro Aŭgusto ene de la romia provinco Tarrako en la Ibera Duoninsulo. Nuntempe restas kelkaj kolonoj, supozeble parto de romia templo.

Vere, urbo Purchena estis fondita de la araba emiro Abdallah en la 9-a jarcento kun la nomo *Hisn Burxana.* Araboj starigis fortreson por defendi la urbon, ĉi tiu defenda konstruaĵo estis tre efika, ĉefe en la jaro 1125, kiam la aragona reĝo sieĝis ĝin, sed li fine ne sukcesis konkeri la urbon.

Purchena estis unu el la plej gravaj vilaĝoj de la nazara emirlando de Granado, emiro mem, Jusuf la 1-a vizitis la urbon kaj laŭdis la forton de la fortreso kaj la belecon de la moskeo.

La katolikaj gereĝoj ricevis la vilaĝon en decembro de 1489, kune kun aliaj gravaj urboj kiel Baza, Guadix kaj Almerio mem, post la pakto subskribita kun Cidi Yahia Al-Nayar, araba urbestro de Almerio.



Ujoj datumitaj je la Bronzepoko, eltrovitaj apud Purchena.

La konkero de la urbo fare de la kristanaj gereĝoj estis paca, do, la islamaj regantoj de la konkeritaj urboj ricevis donacojn kaj honorojn de la novaj gereĝoj. Tamen, fratoj Ibrahim kaj Abufar Abenedir, islamaj regantoj de Purchena, rifuzis tiujn honorojn kaj ili decidis foriri en la nordon de Afriko, ĉar ili ne deziris vivi sub la kastilia regado. Ĉi tiu historio estis la intrigo de postaj literaturaj verkoj.

En la jaro 1570, Juan de Aŭstrio, militestro de la kastiliaj trupoj, denove konkeris la urbon, tiam ĉiuj ribelantaj moriskoj estis forpelitaj kaj oni repopolis Purchena per nova enloĝantaro veninta el Kastilio.

Depost tiam, Purchena fariĝis tipa andaluzia urbo kies ĉefa viv-rimedo estis kulturado de ter-pecoj kies posedantoj estis riĉaj ter-havantoj.



Partoprenantoj en la Moriskaj Ludoj de Aben Humeja en Purchena (Almerio)

En tiu epoko, la kastilia regado vere estis efemera, tiel en la jaro 1569 moriskoj, idaro de la antikvaj arabaj enloĝantoj de la zono, ribelis kontraŭ la kastilia reĝo. En Purchena la ribelo sukcesis, Aben Humeja, ribelestro vizitis la urbon en la jaro 1569 kaj honore al li oni organizis ludojn kun la partopreno de la enloĝantaro. Ĉi tiuj sportaj ludoj, agnoskitaj nuntempe de la Internacia Olimpika Komitato, ankoraŭ okazas ĉiujare.

En la 19-a jarcento, oni komencis ekspluati minejojn kaj ĉefe marmorajn ŝton-minojn. La tuta zono revigliĝis dank'al la ekspluato kaj transporto de tiuj materialoj, tiel, en la jaro 1890 oni konstruis fervojan linion trapasantan Purchena. Nuntempe, Purchena estas bela vilaĝo kun proksimume 2000 enloĝantoj, dediĉitaj ĉefe al ekspluatado de marmoraj minejoj kaj al ter-kulturado.

## Monumentoj

### • Arkeologia kampo

Kiel dirite, ĉe la arkeologia kampo *Los Churuletes* troviĝas setlejo datumita je la Bronzepoko. Estas eble vidi muregon, tombejojn kaj dolmenojn.

### • Domo de la prokuroro

Temas pri granda domo starigita dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Ĝi estis konstruita por senjoro aŭ altrangulo. Elstariĝas centra korto kun marmoraj kolonoj pli ol du metroj alte.

### • Kastelo

Oni konstruis ĝin dum la islama periodo, en la jaro 888. Nuntempe nur restas kelkaj loĝejoj, cisterno kaj turo, konata kiel la turo de l'akvo. La kastelo estis vera fortreso, malfacile konkerebla, pro la fakto, ke ene de ĝi troviĝas akvo-fonto kaj tio ebligas daŭran rezistadon de la enloĝantaro, eĉ se ili estis ĉirkaŭigitaj. La kastelo estis grava defendilo de la urbo dum la militoj inter kristanoj kaj islamanoj en la 15-a jarcento.

### • Preĝejo de Sankta Gines

Starigita sur antikva moskeo, laŭ teksto de la araba historiisto Ibn Battuta, tiu moskeo estis unu el la plej belaj en Al-andaluso. La konstruo kiel kristana preĝejo komenciĝis en la jaro 1550 dank'al la arkitekto Juan de Oreo. Temas pri renasenca konstruaĵo, kvankam kun tipaj mudeĥaraj elementoj. Ene de ĝi videblas belegaj fresko-pentraĵoj de la 17-a jarcento.




Turo de l'akvo



Preĝejo de Sankta Gines

## La eksterordinara historio de la blazono de Purchena



Purchena, kiel ĉiuj aliaj hispanaj vilaĝoj, havas sian propran blazonon. Tiu de Purchena estas tre simila al la blazono de Kastilio kaj Leono, al ĝi aldoniĝis ŝlosilo apud la kastilia turo, tute simile al la blazono de la najbara urbo Vera.

Post la blazono aperas dukapa aglo, tio ankaŭ estas normala afero, pro la fakto ke preskaŭ ĉiuj urboj en la zono ricevis sian blazonon dum la regado de la imperiestro Karolo la 1-a, necesas diri, ke dukapa aglo estis la simbolo de la dinastio de la Habsburgoj al kiu apartenis la imperiestro. Tamen, la flugiloj de tiu aglo aperas detranĉitaj sur la blazono de Purchena. Kial?

Nu, kiel jam dirite la urbo Purchena aktive kunlaboris en la ribelo de la moriskoj, inter la jaroj 1568 kaj 1571. La celoj de tiu ribelo estis restarigi la islaman povon en la sudo de Hispanio. La trupoj de la hispana reĝo Filipo la 2-a, sub la estrado de Juan de Aŭstrio, luktis kontraŭ tiuj de Aben Humeja, ĉefo de tiu ribelo.

La milito finiĝis en la jaro 1571, tiam ĉiuj moriskoj de tiu zono estis forpelitaj. La reĝo Filipo la 2-a ordonis, kiel kroman punon, detranĉi la flugilojn de la aglo sur la purchena blazono, kun la signifo, ke la urbo ne povus flugi el la kastilia suvereneco.

Tiel, ĝi estas la sola hispana blazono kie la aglo ne povus flugi, ĉar detranĉitaj siaj flugiloj.

### Festoj

Komence de la monato aŭgusto okazas la Moriskaj Sportaj Ludoj de Aben Humeja, memore al tiuj organizitaj de la ribelestro de la moriskoj meze de la 16-a jarcento. Dum tri tagoj okazas sportaj konkursoj kaj muzikaj spektakloj, ĉiuj ili kun moriskaj radikoj. Okazas luktoj, pez-levadoj, brik-subtenado, rapid-kuradoj, triobla salto, ŝton-ĵetado, arko-pafado, inter aliaj. Ofte, sportistoj kaj spektantoj ĉeestas la sportajn kaj muzik-spektaklojn en moriskaj vestaĵoj.

Alia grava festo en Purchena okazas la 25-a de aprilo, honore al Sankta

Marko, temas pri popola festo, oni organizas kermesojn en la kamparo kun abundaj kaj bongustaj manĝaĵoj.

La plej grava festo okazas fine de aŭgusto, honore al Sankta Gines. Okazas tiam tipa andaluzia festo kun ĉeesto de multaj homoj kiuj, pro vivrimedaj kialoj, devis elmigri norden de Hispanio.

## Gastronomio

La gastronomio de Purchena estas tute simila al tiu de aliaj zonoj de la almeria provinco. Tre konataj estas la *olla de trigo*, almeria kocido, temas pri plado kuirita per bolado en kuirpoto plena je akvo, kie oni bolas kune viando-pecojn kaj legomojn. Bongusta estas ankaŭ fritita kuniklaĵo.

Dumpaske oni ellaboras frititajn ringajn kukojn. Pri trinkaĵoj, oni preparas dolĉan vinon kun ŝnapso.






Kvar tagoj en Sevilo suficîs por montri, denove, ke esperanto estas taŭga komunikilo. Renkontiĝis, kadre de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto, proksimume 200 homoj venintaj de pli ol 20 landoj, alvokitaj ne nur pro la ebleco interparoli unu kun aliaj pere de internacia lingvo, sed ankaŭ altiritaj de la beleco de la andaluzia urbo Sevilo. Sur la paĝoj de ĉi tiu numero de ***Gazeto Andaluzia*** ni deziras postlasi grafikan ateston pri ĉio kio okazis.

**Antaŭkongreso.**

Kvankam la kongreso vere okazis inter la 12-a kaj la 15-a de oktobro 2023, jam en la komenco de tiu semajno Prof. Vicente Manzano organizis seminarion en la Universitato de Sevilo, kun la titolo *Internacia Seminario pri Sociaj Retoj kaj Homa Konduto.* La seminarion ĉeestis, fizike aŭ pere de informadikaj prelegoj, pluraj universitataj profesoroj de la tuta mondo. Tiel, oni povis aŭskulti prelegojn kaj komunikaĵojn de prelegantoj de Hispanio, Francio, Germanio, Italio, Irano, Japanio, Kostariko, Rusio, Serbio kaj Usono.



## Ĵaŭdon, la 12-an de oktobro 2023




Maldekstre-dekstren, Manuel Ramírez Cepeda, Antonio Rodríguez Gasch, José María Rodríguez kaj Juan de Dios Montoto, kun-aŭtoroj de la libro "125 años de esperanto en Sevilla" prezentas sian verkon.




Libro pri historio de esperanto en Sevilo prezentita dum la Kongreso.





Post la prezento de la libro okazis festeto honore al la 112-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo Esperantista de Sevilla.





## Vendredon, la 13-an de oktobro 2023




José Roldán, prezidanto de la Organiza Komitato parolas okaze de la malfermo de la Kongreso.



Dum la kongreso okazis, entute, dek prelegoj pri tre diversaj temoj. Apude, Ana Manero parolas pri "Bibliotekoj tra la Historio". →




↑ Sopranulino Rocío de Frutos kantis la esperanto-himnon.

Gejunuloj de la stud-objekto "Esperanto y Valores Europeos" de la Gimnazio Almenara de Vélez-Málaga kaj la profesoroj vizitis la romiajn restaĵojn en la urbo Italiko. →



# Bilda raporto pri la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto - Sevilo, oktobro 2023



La deklamado de poemoj ja estis kortuŝa, ĉar al la bela legado de Ana Manero kaj Ángel Arquillos aldoniĝis la emocia sono de sitaro.



Gabriela Manzano estis la plej juna preleganto en la Kongreso. Ŝi prezentis al ĉeestantoj sian jutuban kanalon *Pika Pika Esperanto.*



Profesoro Philippe Planchon, de la Universitato de Tours (Francio) parolas pri "Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco".



Junaj gepartoprenantoj en la Kongreso, diversaj naciecoj sed nur unu lingvo.



Ankaŭ estis tempo por ĝui la mirindaĵojn de Sevilo.

# Bilda raporto  pri la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto - Sevilo, oktobro 2023

## Sabaton, la 14-an de oktobro 2023



La vizito al Belarta Muzeo de Sevilo estis tiel sukcesa, ke oni devis organizi diversajn grupojn, ĉar ne ĉiuj gekongresanoj povus eniri amase.
Jen unu el ili

Tipa sevila grupo de kastanjet-ludantoj montris al publiko en la kongresejo, ke estas eble muziki per tiu simpla frap-instrumento.





Libro-servo dum la Kongreso estis tre enhavo-riĉa. Multan dankon al ĉiuj kiuj aĉetis librojn kaj materialojn en esperanto.

# Bilda raporto pri la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto - Sevilo, oktobro 2023



Kvankam programeroj dum la Kongreso finiĝis ĉiutage je la 21:00, ŝajnas ke *debatoj kaj diskutoj* daŭriĝis poste, kompreneble ne necese pri la lingvaj problemoj, ĉu?




Oficialaj fotoj de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo



# Bilda raporto pri la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto - Sevilo, oktobro 2023

## Dimanĉon, la 15-an de oktobro 2023




↑ La Talenta Teatra Trupo, amatore, ludis tri teatraĵojn dum la Kongreso.




D-ro Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio prelegis pri la oficiala temo de la Kongreso "Komprenemo inter popoloj".

Tonyo del Barrio gvidis aŭkcion de esperantaĵoj. Jen la lasta programero de la Kongreso. →




Ĉeestis proksimume 200 geesperantistoj venintaj de:

| | | |
|---|---|---|
| Hispanio | Meksikio | Rusio |
| Portugalio | Koreio | Venezuelo |
| Francio | Filipinoj | Usono |
| Italio | Rumanio | Aŭstrio |
| Germanio | Serbio | Kipro |
| Belgio | Slovenio | Kroatio |
| Nederlando | Armenio | Bulgario |

# Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

## Joaquín Mañas kaj la "Centro Técnico" de Malago.

Sciate, ke unu el la ĉefaj lokoj tra kie esperanto eniris en Hispanion estis la urbo Malago. Tie, eksa volapukisto José Rodríguez Huertas interesiĝis pri nova lingvo proponita de pola doktoro, prezentita al la mondo sub la pseŭdonimo *Doktoro Esperanto*. José Rodríguez estis granada instruisto, de la urbo Gvadiks', li fondis kaj estris la privatan lernejon "San Hermenegildo" komence de la 20-a jarcento en la urbo Malago.

Li estis ankaŭ efika propagandisto de la lingvo, tiel li altiris la intereson de pliaj malaganoj, do, komence de la 20-a jarcento oni povas kalkuli, ke troviĝis en tiu andaluzia urbo pli ol 30 geesperantistoj. La klopodoj disvastigi esperanton fare de Rodríguez Huertas atingis ĉiujn tavolojn de la malaga socio, inter tiuj unuaj malagaj interesitoj aperas profesoroj, komercistoj, laboristoj kaj militistoj. Li eĉ altiris la atenton de eksterlandanoj loĝantaj en Malago, do, inter tiuj unuaj esperantistoj troviĝis italo kaj brito.



Ĉe la palaco Coprani, en la malaga kvartalo La Merced, fondiĝis la lernejo "Centro Técnico".

Dank'al intensa agado de Rodríguez Huertas, esperanto fariĝis komuna kaj interesa afero en la malaga socio. Sendube pro tio, unu el la plej gravaj privataj akademioj de la urbo, la *Centro Técnico* enirigis esperanton inter la stud-objektoj de tiu lerno-centro. La *Centro Técnico* estis lernejo fondita de militisto, kapitano Joaquín Mañas Hormigo, kies ĉefa celo estis faciligi la enirigon

de malagaj junuloj en oficialajn publikajn postenojn aŭ en milit-lernejojn, tamen, ankaŭ temis pri lerno-centro por infanoj kaj junuloj. La instruado al junuloj devis esti tiel praktika, ke ĉe tiu centro naskiĝis la unua malaga skolta grupo, supozeble kelkaj el ili interesiĝis ankaŭ pri tiu nova lingvo instruita ĉe la *Centro Técnico.*

por milit-oficiroj, ĉe la urbo-centro, ĝuste ĉe la palaco Cropani, sur la nuntempa strato Alamos.

Joaquín Mañas estis tre konata en Malago ankaŭ pro alia grava afero. En la jaro 1927, oni nomumis lin estron de la Kunfrataro de Mena, kiu dumpaske aranĝas unu el la plej belaj religiaj


CENTRO TÉCNICO
INCORPORADO AL INSTITUTO
27, Hoyo de Esparteros, 27.
MÁLAGA
Director: Don Joaquín Mañas (Capitán de Infantería.)
PRIMERA Y SEGUNDA ENSEÑANZA
*CARRERAS MILITARES.*—Preparación completa para el ingreso en cualquiera de las Academias del *Ejército, Cuerpo general y Administración de la Armada.*
*CARRERAS CIVILES.*—Ingenieros industriales y mecánico-electricista; ayudantes y sobrestantes de Obras públicas; Correos; Telégrafos; Tabacalera; Magisterio; torreros de faros; topógrafos; interventores del Estado en los ferrocarriles; Banco de España.
COMERCIO.—ADUANAS.—FACULTAD DE DERECHO.
Idiomas: Francés, Inglés, Alemán, Italiano, Arabe, Esperanto.
Correspondencia y Contabilidad mercantil en todos ellos.
Adorno: Dibujos, Pintura, Música, Modelado, Esgrima y Gimnasia.
Este Centro garantiza el positivo aprovechamiento de sus alumnos, por su sistema especial de enseñanza, basado en los modernísimos métodos pedagógicos nacionales y extranjeros.
ENSEÑANZA POR CORRESPONDENCIA
Se admiten internos y mediopensionistas. Pídanse reglamentos y cuantos datos se deseen sobre cualquier enseñanza ó carrera á secretaría.

Reklamo en tiutempa malaga ĵurnalo, tie oni sciigas pri la ebleco lerni esperanton, kune kun aliaj lingvoj.

Ĉe la *Centro Técnico*, rilate lingvojn, estis eble lerni la francan, anglan, germanan, italan, araban kaj esperanton. Ĉu la direktoro de la lernejo Joaquín Mañas estis esperantisto? Neniu datumo ekzistas pri ebla esperantisteco de la kapitano Mañas, sed sendube li rilatis kun esperanto-parolantoj, pro la fakto, ke li ne dubis enirigi la internacian lingvon kiel stud-objekton en sian lernejon. Li estis militisto, kiam li atingis la kapitanan rangon li decidis malfermi privatan lerno-centron, por ebligi al junuloj eniri en lernejojn

paradoj en Malago. Kiel militisto, Mañas subtenis grandan amikecon kun José Sanjurjo, alta komisaro de Hispanio en la nordo de Afriko. Do, ĉi tiu estis invitata ĉeesti la religian paradon en la jaro 1928. Post konversacioj, oni decidis ligi la Hispanan Legion, tio estas la plej grava milita hispana trupo en la nordo de Afriko, kun la Kunfrataro.

Tiel, en la jaro 1929, trideko da oficiroj kaj 200 soldatoj, membroj de la Hispana Legio, paradis apud la religia figuro de Kristo krucumita. Depost tiam, la plej grava kaj vidinda

religia parado en Malago estas tiu en kiu ankoraŭ nuntempe, paradas la hispanaj legianoj en Malago.



Joaquín Mañas Hormigo

≈

# Esperanto, ponto inter popoloj.



Ponto de *Vadollano* en Linares' (Jaeno).
Romia ponto de la 3-a jarcento p.K.

# Vojaĝi en la estontecon estas eble

Unu el la plej oftaj intrigoj en sciencfikciaj filmoj pritraktas la temon pri la tempaj vojaĝoj. Laŭ tiuj verkoj, homoj naskiĝontaj en la estonteco kapablas, pere de komplikaj maŝinoj, veni en la pasintecon, kaj inverse kompreneble. Sed, eblas demando, ĉu ĉi tio okazas nur en la scienca fikcio? Ĉu oni povus vojaĝi en la estontecon aŭ en la pasintencon nuntempe?

Nu, vere tio ne povas okazi -almenaŭ hodiaŭ- tiel kiel priskribas tiuj historioj, tamen ekzistas loko en la mondo kie estas eble vidi la estontecon, aŭ inverse la pasintecon. Jes ni vidu:

Meze de la Beringa markolo, ĝuste inter Azio kaj Ameriko, troviĝas du malgrandaj insuloj, temas pri Diomedo Maĵora kaj Diomedo Minora, respektive ili troviĝas sub la regado de Rusio (Maĵora) kaj de Usono (Minora). Inter ambaŭ insuletoj ekzistas apenaŭ kvar kilometroj, dumvintre ili eĉ estas unuigitaj pro la frostigo de la oceano.

Diomedo Minora, usona teritorio en la ŝtato Alasko, havas enloĝantaron, kvankam ne multajn, apenaŭ 150 homojn. Diomedo Maĵora, sub rusa suvereneco, estas senloĝa teritorio.



La plej eksterordinara afero estas la fakto, ke inter ambaŭ insuloj trapasas imageblan linion difinitantan unu kaj alian tempo-zonon. Do, kiam en Diomedo Minora estas dimanĉo, en la apuda insulo, Diomedo Maĵora, estas lundo. Tiel, je apenaŭ kvar kilometroj estas eble vidi estontecon aŭ pasintecon, kaj eĉ vojaĝi en unu aŭ alian tagon se ni faras mallongan 4-kilometran vojaĝon.

Rusio, male Diomedo Minora restos sub usona suvereneco. Post kelkaj jaroj, nur la usona insulo restis kun enloĝantaro, eĉ se minimuma kvanto.

Kvankam dumvintre estas eble piediri de unu en alian insulon pro la frostigo de la mar-akvo, tiu trapasado estas tute malpermesita, pro la fakto ke ne ekzistas administracia dogano inter ambaŭ teritorioj.




Okcidentaj esploristoj kontaktis kun la enloĝantoj de ambaŭ insuloj en la 19-a jarcento. Ili estis fiŝ-kaptistoj, apartenantaj al inuit-civilizacio. Balenoj estis la centro de iliaj vivoj, la ĉefa viv-rimedo, same balena bildo aperis ĉiam en ĉiuj religiaj festoj de tiu popolo.

En la 19-a jarcento Rusio vendis Alaskon al Usono. Laŭ tiu traktato Diomedo Maĵora daŭre apartenos al

Tamen, post la jaro 1988 Rusio permesas kontaktojn kun loĝantoj de la usona insulo, kondiĉe ke ili subtenas familiajn rilatojn kun aliaj familioj en Siberio.






# Flamenko

## La Flamenka Fuzio

Flamenko enradikiĝas profunde en la andaluzia kulturo, tamen des pli konektita estas la mondo ju pli muziko evoluas pro la konstantaj kontaktoj de unu kun aliaj. Kompreneble, flamenka arto ne estas escepto pri tio. Kunfandiĝo de muzikaj stiloj igis, ke kelkaj flamenkaj artistoj deziras plilongigi siajn kreivajn horizontojn.

Ĉi ĉio ne estas nova afero, jam en la 1970-jardeko, kelkaj flamenkaj artistoj komencis eksperimenti sian muzikon, aldonante elementojn proprajn de aliaj stiloj, kiel ĵazo, rokenrolo, latin-muziko ktp. En tiuj jaroj ĉi tiu nova stilo ricevis la nomon *Novan Flamenkon*, kvankam nuntempe estas pli konata kiel *Flamenka Fuzio.*




*"Entre dos aguas"* (Inter du akvoj), rumbo kiu troviĝas en la disko *"Fuente y Caudal"* de Paco de Lucía (1973), estis la komenco de nova erao en la flamenka gitar-ludado.

Tutcerte, la unua flamenka artisto kiu faciligis tiujn kontaktojn inter malsimilaj muzik-stiloj kaj flamenko estis Paco de Lucía. Lia disko *"Al Di Meola, John McLaughlin, Paco de Lucía: Friday Night in San Francisco"* estas mejloŝtono en la flamenka gitar-ludado, ĉar li kunfandigis la andaluzian flamenkon kun ĵazo kaj rok-muziko. Eĉ lia mita verko "*Entre dos aguas"* havas kiel karakterizo la aperon de konstanta bas-gitaro, tio ja estis novaĵo en flamenka muzik-verko. Ankaŭ kantistoj, kiel Juan Peña El Lebrijano, aldonis al flamenko elementojn de la al-andalusa muziko, kaj Enrique Morente, kvankam pura flamenka kantisto, ne dubis kunfandigi flamenkon kaj rok-muzikon.

Dum la 1980-jardeko, nova generacio de flamenkaj artistoj aperis, ĉiuj ili sciigis sian admiron al *Camarón,* Morente kaj Paco de Lucía,

sed ili ankaŭ ludis urbajn muzikojn, ekzemple, muzik-ensemblo *Pata Negra* ne dubis enirigi elementojn de aliaj muzik-stiloj kiel blus' aŭ rok'; alia ensemblo, Ketama, preferis kunfandigi flamenkon kun kubaj elementoj kaj tiel plu.

kiuj povus miskompreni, se ne ekzistus tiu kunfandiĝo kun aliaj stiloj, ke flamenka muziko apartenas al pasintaj generacioj.

Oni devas kompreni, ke la nova flamenka fuzio ne anstataŭigas la



*Pata Negra*, formita de la fratoj Raimundo kaj Rafael Amador

Kompreneble, ne ĉiuj akceptas tiun evoluon de la flamenka arto. Kelkaj flamenkaj tradiciistoj, nomitaj "*puristoj* " asertas, ke tiu kunfandiĝo paligas la esencon kaj la aŭtentikecon de la flamenko, same la akcepto de eksterlandaj elementoj povas preteratenti la flamenkajn radikojn, tipe andaluziaj.

Aliuloj opinias male, laŭ ili nur temas pri natura evoluo por vivigi flamenkan tradicion, krome oni faciligas la alvenon de novaj generacioj, pli junaj,

tradician flamenkon, ĝi nur riĉigas ĝin ĉar oni diskonigas la ekziston de ĉi tiu muzik-stilo en mondo kie ŝanĝoj konstante okazas. Landlimoj ne ekzistas, ankaŭ ne ĉe la flamenka arto.



# Fervojista Angulo

## La tramo de Jaeno. Ĉu forgesita afero?

Se vi promenas tra la belega urbo Jaeno, vi rimarkos la ekziston de reloj meze de avenuo ĉe la centra kvartalo de la urbo. Certe temas pri forgesitaj reloj, ĉar neniu vagonaro uzas ilin, sciu ke temas pri la tramo de Jaeno.

En la jaro 2007 oni proponis, unuafoje, konstruon de tramo en ĉi tiu andaluzia urbo. Celo estis konekti la centran parton de Jaeno kun la universitato kaj la hospitalo, troviĝantaj ambaŭ ĉe ekstera parto de la urbo. Tuj poste, oni subskribis akordon inter Urbodomo de Jaeno kaj Andaluzia Registaro por konstrui tiun veturilon, laŭ oni diris tiam, ĝi povus ekfunkcii jam en la jaro 2009.

Laŭ tiuj unuaj planoj, la tramo etendiĝus tra proksimume 5 kilometroj kun 10 haltejoj. Tamen, ne ĉiuj sociaj sektoroj en la urbo akceptis la proponon. Komenciĝis tiam kampanjon por rifuzi tiun projekton, fare de politika partio.

Kiel okazas ofte, la komenco de la laboroj prokrastiĝis, tiel, nur en aprilo de 2009 ili komenciĝis. Kompreneble la konstruaj laboroj okazigis grandajn problemojn en la urba trafiko, pro la fakto, ke la plej centraj kaj longaj avenuoj devis fermiĝi al aŭtomobiloj. Same, ĉar Jaeno estas urbo kun abunda historio, dum la laboroj oni eltrovis arkeologiajn restaĵojn de la romia kaj




Tramo sur centra avenuo en la urbo Jaeno

araba civilizacioj, inter ili hidraŭlika konstruo ĝuste sur la loko kie troviĝis stacidomo.

Konstruo de la infrastrukturo de la tramo finiĝis en decembro de la jaro 2010. Du monatojn poste okazis la unuaj realaj pruvoj de la vagonaro en la urbo, tiel komence de 2011 la unua tramo trakuris jaenajn avenuojn. La urbodomo de Jaeno aĉetis 5 lokomotivojn, modelo *Citadis 302*, pro 26 milionoj da eŭroj.



Konstruo de tram-reloj en Jaeno

En majo 2011 la unuaj pasaĝeroj povis vojaĝi sur la tramo, la urbodomo proponis senpagan uzon de la vagonaro dum la unuaj kvin monatoj. Okaze de la unua tago uzis la tramon preskaŭ kvin mil homoj, en la dua tago estis pli ol ok mil. Tamen, tiam komenciĝis problemoj.

Decidita la senpaga uzo de la tramo dum la unuaj kvin monatoj, la entrepreno administranta publikajn aŭtobusojn en la urbo, decidis plendi ĉe juĝa instanco kontraŭ la decido faciligi senpagan uzon de la tramo, pro nelojala konkurenco. Kompreneble, se tramo estis senpage uzebla, eĉ se nur dum la unuaj kvin monatoj, tio kaŭzus grandajn perdojn al bus-kompanio. La juĝa decido estis favora al plendanta kompanio, do, oni decidis nuligi la senpagan uzon de la tramo.

Post la juĝa decido, la tram-kompanio informis, ke oni ne disponis en tiu momento pri taŭga ilaro por bilet-vendado. Do, fine de la monato majo 2011, oni decidis ĉesigi provizore la tram-servon en la urbo Jaeno.

En la jaro 2018, jaena urbodomo kaj la andaluzia registaro subskribis definitivan akordon por refunkciigi la tramon. Laŭ tiu kunveno la registaro pagus 75% el la kosto kaj la loka urbodomo la cetera 25%. En la monato marto de 2023 oni decidis reguligi la eluzitan infrastrukturon kun la espero ekfunkciigi denove la tramon komence de la jaro 2025.

Rilate la simbolaron de la tram-servo, la loka urbodomo proponis ideo-konkurson al lerno-centroj de la urbo, kun la celo instigi al la lernantaro proponi desegnaĵojn kaj logotipon, nur kun la kondiĉo uzi kolorojn oliv-verdan kaj violan, ambaŭ koloroj estas intime ligitaj al la geografio kaj al la historio de la urbo. Fine, oni decidis aperigi la mitan legendan lacerton de Jaeno sur la vagonaro.

**nun ni**

# junularaj paĝoj

Seguimos con la idea de formar un grupo de hablantes y simpatizantes del idioma internacional menores de 35 años en Andalucía. El objetivo de este grupo, al que hemos llamado Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo -AJEU- y que esperamos que algún día llegue a ser una asociación formalmente constituida, sería agrupar a todos los jóvenes esperantistas andaluces y organizar, en la medida de nuestras posibilidades, actividades recreativas que nos ayuden a perfeccionar el conocimiento del esperanto.

Si te interesa el proyecto contacta con nosotros. No es necesario pagar cuota alguna. El primer paso sería conocer cuántos esperantistas andaluces son menores de 35 años y tienen ganas de asociarse para pasarlo bien gracias al idioma internacional. Por eso te invitamos a que contactes con nosotros a través del correo ajeu@esperanto.ac y a que propongas las ideas que creas más interesantes para este nuevo proyecto.

**Se vi estas juna (-35 jaraĝa) kaj vi deziras aliĝi al andaluzia E-asocio specife por gejunuloj, AJEU estas inda projekto por kunlabori. Kontaktu kun ni pere de la adreso: ajeu@esperanto.ac Kaj ne forgesu proponi tion kion vi konsideras interesa por la andaluzia esperantista junularo.**

Y presentamos ahora la que podría decirse que ha sido la primera actividad pensada para jóvenes hablantes y simpatizantes de esperanto en Andalucía después de muchos años. Se trata de la visita de los alumnos de la asignatura "Esperanto y Valores Europeos" al conjunto arqueológico de Itálica y después al Congreso Español de Esperanto que se celebraba en Sevilla.

Tuvo lugar el pasado 13 de octubre de 2023 y participaron 14 estudiantes y 2 profesores, entre ellos Fabián Jiménez, profesor de la asignatura. Todos ellos venían del IES Almenara de Vélez-Málaga (Málaga). Te enseñamos algunas fotos de la actividad, los comentarios en esperanto, seguro que los entiendes.



En la gimnazio Almenara de Vélez-Málaga (Malago) ĉio estas preta por ekvojaĝi.



En la arkeologiaj restaĵoj de Italiko, nia gvidistino Raquel afable montris la ni la urbon kie naskiĝis romiaj imperiestroj Hadriano kaj Trajano. Aliaj junaj esperantistoj -kaj ne tiel junaj- aliĝis al la vizito.




Post vizito al arkeologiaj restaĵoj en Italika, bongustaj picoj kaj glaciaĵoj en apuda vilaĝo Santiponce.




Poste, ĉe la loko kie okazis la Hispana Kongreso de Esperanto, du lernantoj rolis kiel aktoroj en la teatra verketo *"La Akuza(n) tivo"*. Ili tre bone aktoris. Ĉu fine ili ricevis kroman poenton laŭ la promeso de la profesoro Fabián? Esperebl...promeso estas promeso!



Fine, oni organizis konkurson en la kongresejo. Estis ridoj, bon-humoro, gigantaj ĵet-kuboj kaj jen la premio por la venkanta teamo...



Kroko, la pluŝa krokodilo !



# Andaluzia Kuirarto

## Kokidaĵo laŭ maŭra stilo

Kokidaĵo estas la bazo de multaj andaluziaj receptoj, ĉefe pro la fakto ke, tradicie, temas pri malmulte kosta kaj tipa viando, do ĝi povus aperi de tempo al tempo sur la menuoj de preskaŭ ĉiuj andaluziaj familioj.

Ekzistas centoj da stiloj por kuiri kokidaĵon, ĉi tiu recepto, kiun ni prezentas hodiaŭ, nomiĝas "Kokidaĵo laŭ maŭra stilo", kvankam ni ne scias, ĉu ĝi aperis dum la islama ĉeesto en Andaluzio.

**Jen la ingrediencoj por du homoj:**

- Cepoj (2).
- Kokidaĵoj, la suba parto de la birdo-brusto (5).
- Oliv-oleo.
- Laŭro (1 folio).
- Salo.
- . Migdalo (20 gramoj).
- Sekaj prunoj (4).
- Sekaj vinberoj (10 gramoj).
- Nigraj olivoj (8).
- Muelita moskato (½ kulereto).
- Salo.
- Cinamo (½ kulereto).
- Kariofilo (1).
- Malmole kuirita ovo.
- Akvo



**Kaj jen la preparado:**

1) Sen-ŝeligu kaj distranĉu la cepojn. Metu ilin enen de poto kun oliv-oleo, super ne-intensa fajro. Aldonu ankaŭ la laŭr-folion. Post kelkaj minutoj, kiam cepo fariĝos preskaŭ travidebla, enmetu la kokidaĵojn, entute 5 subaj partoj de la birdo-brustoj.



2) Ekfritetu la kokidaĵojn, ĝis kiam ili fariĝos iomete or-koloraj. Aldonu migdalojn, sekajn prunojn, sekajn vinberojn kaj nigrajn olivojn.



3) Post 2 aŭ 3 minutoj, aldonu cinamon, muskaton, kariofilon kaj salon. Verŝu akvon (100/125 mililitrojn). Kuiru ĉion dum 15 minutoj super mezforta fajro.



4) Post tiuj 15 minutoj, aldonu tranĉitajn ovojn kuiritajn kaj denove kuiru ĉion dum 15 minutoj pliaj, aŭ ĝis kiam kokidaĵo fariĝos sufiĉe malmola.



5) Ne metu la kuiraĵon tuj poste sur la telero, lasu ĝin ripozi iomete kun la fajro estingita, proksimume dum kelkaj minutoj.



# Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

## La ekzekutisto de la Granada kortumo

Sur aliaj numeroj de nia revuo ni jam parolis pri strangaj fenomenoj okazintaj en la urbo aŭ en la provinco Granado. Sendube temas pri urbo kaj zono plena je mistero. Hodiaŭ ni parolos pri unu el la lastaj oficialaj ekzekutistoj de la Reĝa Justica Kortumo de Granado.

Ĉi tiu juĝa instanco aplikis justicon en la sudo de Hispanio laŭ dekreto de la Katolikaj Gereĝoj de la jaro 1500. En la jaro 1834 ĉi tiu instanco estis anstataŭigita de la Provinca Kortumo de Granado, nuntempe en tiu palaco troviĝas la Supera Tribunalo de Andaluzio.

Sciate, ke en la pasinteco en nia lando ekzistis morto-puno. Tiel, tribunalo, de tempo al tempo, proklamis verdiktojn kiuj kondamnis al akuzito morti. Normale, temis pri kondamnitoj pro murdoj aŭ tre gravaj krimoj. Pro tio, ekzistis en nia lando homoj kies tasko estis realigi tiun kondamnon, ili estis ekzekutistoj. Vere temis pri ne estimata profesio, do tiu labor-posteno ofte pasis de patroj al filoj. Por efektivigi la kondamnon je morto-puno en tiutempa Hispanio, oni uzis strangolilon. Temas pri terura maŝino pere de kiu la kondamnito mortis pro sufokpremo de la ĝorgo kaj frakturo de la kolo.



Strangolilo estis la oficiala instrumento en Hispanio por apliki morto-punon.

Unu el la lastaj oficialaj ekzekutistoj agantaj en la Granada Kortumo estis Lorenzo Huertas (1829-1900). Li, fine de la 19-a jarcento multe "laboris", tiel, inter la homoj kiujn li ekzekutis

troviĝis fiuloj kiel Juan Díez de Garayo *"El Sacamantecas"* (La Sentripigantulo). En 1881 li murdis almenaŭ 6 virinojn, kvankam verŝajne li respondecis pri, entute, 13 murdoj. Same, en la jaro 1897 li ekzekutis al Juan Serrano Arévalo *"El Tigre"* (La Tigro), kiu murdis sian patron. La ekzekuto de ĉi lasta ulo okazis en Jaeno, laŭdire pro la malvarmo de la matena horo, la ekzekutisto, antaŭ ol iri en la karceron por plenumi sian funkcion, haltiĝis ĉe ĉiuj ekzistantaj trinkejoj, por trinki glason da ŝnapso.

Ne nur la laboro de Lorenzo Huertas estis terura, ankaŭ lia propra figuro estis timema. Li ĉiam uzis nigran longan mantelon kaj ĉapelo kun larĝa rando. Tutcerte ĉiuj evitis lin kiam li surstrate promenadis tra la urbo Granado.


Lorenzo Huertas forpasis en Asturio en la jaro 1900. La terura maŝino de li uzita por plenumi lian laboron, ankoraŭ troviĝas en ĉambro de la Granada Kortumo. Laŭdire, post la morto de la ekzekutisto ekokazis en tiu palaco strangaj fenomenoj. Objektoj moviĝas, ekmalvarmiĝas ĉe konkretaj lokoj de la palaco kaj videblas stranga figuro kiu, sen kruroj, ŝvebas en la aero. En la jaro 1988 purigistino tie laboranta vidis teruran figuron vestitan en granda nigra mantelo kaj granda ĉapelo kiu trakuris koridoron en la palaco.

Laŭ ĉiuj vid-atestantoj asertas, ĉi ĉiuj fenomenoj okazas proksime al la maŝino uzita de la ekzekutisto.

Antikva Granada Justic-kortumo, nuntempe tie troviĝas la Supera Tribunalo de Andaluzio.



# Vorto-Ludoj



## Krucvorto

| | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | ■ | |
| 3 | | | | | | ■ | | |
| 4 | | | | | | ■ | | |
| 5 | | | | | ■ | | | |
| 6 | | | | | ■ | | | ■ |
| 7 | | | | | | | | |
| 8 | | | | ■ | | | | |

***HORIZONTALE***

1. Afero de malgranda valoro aŭ graveco.
2. Lirika poemo de melankolia aŭ sopira tono. ■ Finaĵo de akuzativo.
3. *(Akuzative)* Civitano de norda eŭropa lando. ■ En nepreciziĝita loko.
4. Ekskrementa likvo, elfiltrata el la sango. ■ *(Inverse kaj sen la lasta vokalo)* Movo en ia direkto.
5. *(Inverse kaj adverbe)* Doktrino, sistemo. ■ *(Inverse)* Dekfoje cent.
6. Cilindra metala peco. ■ Sufikso esprimanta pasivon kaj ĝisfinan plenumon de la procezo.
7. *(Inverse)* Alkoholo derivita de hidrokarbono.
8. *(Sen la lasta vokalo)* Elektre ŝargita formo de molekulo aŭ de atomo, kiu akiris aŭ perdis elektronojn. ■ *(Akuzative)* Rilata aŭ apartenanta al li.


### *VERTIKALE*

A. *(Plurale)* Ano de nomada araba gento.
B. Aparato por averti pri danĝero per sona signalo.
C. *(Akuzative)* Grupo de arbustoj kaj arbustetoj kun orflavaj floroj.
Ĉ. *(Akuzative)* Dolorplena lasta batalo de mortanto kontraŭ la morto.
D. Portebla, senkovrila, ligna kuvo en formo de duonbarelo. ■ Prepozicio montranta direkton aŭ celon de ia movo aŭ fizika ago.
E. Malongigo de la internacia lingvo. ■ En ŝipo, enlasi akvon kies kareno estas ial difektita.
F. Videbla sur la luksemburgaj aŭtomobiloj. ■ *(Inverse)* Venigi al si ion.

G. *(Inverse)* Esprima aspekto de la vizaĝo kaj de la sinteno ■ *(Sen la lasta vokalo)* membro de grupo aŭ de societo.

## SOLVOJ AL LA PASINTA LINGVA PIRAMIDO

O
O N
A N O
L A N O
L I A N O
A L I E N O
V E N I A L O
V A L E N C I O



## SOLVOJ AL LA PASINTA KRUCVORTO

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| B | A | N | K | R | O | T | O | N |
| U | R | I | N | O | ■ | A | K | E |
| L | E | S | I | V | A | J | N | ■ |
| T | O | ■ | D | E | R | V | I | Ŝ |
| E | L | S | O | R | Ĉ | A | S | ■ |
| N | O | A | ■ | S | O | N | ■ | I |
| O | ■ | L | E | O | N | O | J | N |

## HUMURO



# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
# Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro Directiva

| | |
|---|---|
| Prezidanto / Presidente: | Ángel Arquillos López |
| Vicepresidente / Vicprezidanto: | Fátima Jiménez García |
| Sekretario / Secretario: | José Mª Rodríguez Hernández |
| Kasisto / Cajero: | Mª Dolores Torres Mateo |
| Voĉdonantoj / Vocales: | Jordi Lietor López |
| | Juan García del Río |
| | Carlos Spinola |
| | Alejandro Burgos Escalante |
| | Juan Díaz Casado |

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: @AndaluzioEO

Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org




***Ĉu vi volas koni la historion de nia lingvo kaj movado en Sevilo?***

***Pro 15 eŭroj aĉetu libron eldonitan de nia asocio.***

***Kontaktu: cordoba14@esperanto.ac***